




# Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro

Januaro 2016 n-ro: 1



## Salutojn !

Nia revueto la "Turka Stelo" kiun ni komencas eldoni monate ekde la januaro 2016 estos la voĉo de la turka esperantistaro en nia movado. Per tiu revueto ni celas kaj esperas altiri la atenton de la turkaj Esperantistoj, kaj komencantoj kaj progresantoj kaj ankaŭ la interesiĝantoj de nia kara lingvo. Ni celas ke tiu revueto estu la ligilo inter ni. Ni esperas ke la gazeteton legos komencatoj kun interesejo kaj tiel ili pliboniĝos ilian lingvokapablon.

Nia revueto en la komenco estos simpla kaj minimume nur du paĝa sed ne estas limo en la nombro de paĝoj. Ni bonvenas ĉiujn turkajn kaj fremdajn Esperantistojn skribu artikolojn, sendu leterojn, ŝercojn, enigmojn kaj esprimi siajn opiniojn pri diversaj mondaj aferoj ĉefe pri Esperanto sed neniam pri politiko aŭ religio, kaj tiel helpu subteni nian revueton.

Ni jam decidis pri la operacio. La kolektado de artikoloj okazos en la unuaj dek tagoj de la monato. Dum la duaj dek tagoj de la monato la artikoloj estos reviziitaj. Kaj en la finaj dek tagoj la gazeteto estos enpaĝigita. La disdono de nia gazeteto okazos pere de google retpoŝt-grupo kaj tio okazos en la unua semajno de la sekva monato. Do tiuj kuj volas aboni al la Turka Stelo bonvolu sendi aliĝpeton al la grupo kies ligilo estas jene, aŭ sendu abonpeton al la jenan retpoŝt-adreson. ■

turka\_stelo@googlegroups.com

vasilkadifeli@gmail.com

## Kursoj

### Nia kurso por komencantoj daŭras!

La kurso kiu komenciĝis oktobre daŭras sukcese. La kurson instruas kaj gvidas Murat Özdizdar kaj helpas lin Vasil Kadifeli. Murat nuntempe estas eble la plej malnova Esperantisto en Turkujo. Li esperantiĝis antaŭ pli ol 30 jarojn. La kursmaterialo estas la tre sukcesa lernolibro "Esperanto per Rekta Metodo" de slovaka esperantisto Stano Marček. La kurso okazas ĉiu merkredo en la malsanulejo de Hasanpaŝa najbaro ĉe Kadıköy distrikto inter la horoj 18:00 kaj 20:00. Nia amiko d-ro Barış Yılmaz gastigas nin ĉiu-semajne kaj eĉ preparas al ni teon.



Fatma Eroğlu kaj Ezgi Bilir estas la du novaj lernantinoj kiuj bonege lernas nian lingvon. Ankaŭ nia malnova ĉina amiko kara Ba Jin sekvas la kurson. Ba Jin diras, ke li lernas la turkan kune kun Esperanton. En novembro du aliaj gelernantoj Nermin Mete kaj Erol Mete denove partoprenis al nia kurso. Kaj certe nia amiko d-ro Barış sekvas la kurson. Ni atendas partoprenon de aliaj interesiĝantoj al nia kurso.

Certe Istanbul estas grandega kaj homamaso urbo kaj tio malhelpas la alvenon de novaj gelernantoj. Tiuj, kiuj volas partopreni al nia kurso povas kontakti nin pere de nia facebook-grupo "Esperanto Türkiye" kies ligilo estas jene:

<https://www.facebook.com/groups/7121509722/>

## La Esperanto kurso en la lernejo Üsküdar Amerikan Lisesi

Murat Özdizdar kiu estas ĥemia instruisto en la lernejo Üsküdar Amerikan Lisesi instruas Esperanton al siaj gelernantoj ekster la lernejaj horoj. Jam por multaj jaroj li formis Esperanto-klubon en la lernejo kaj tiel li disvastigas Esperanton. La kurso daŭras sukcese.

### Esperanto-Sumoo



**Datoj pri Esperanto-Sumoo en la nova jaro:**

-----  
2015-11-19 2:21  
GMT+02:00 HORI Jasuo

Karaj, Mi planas okazigi la sumoon en 2016 jene:

Januaro: 1/10-1/24 (15 tagoj)  
Marto: 3/13-3/27 (15 tagoj)  
Majo: 5/8-5/22 (15 tagoj)  
Julio: 7/3-10 (8 tagoj) \*  
Septembro: 9/11-9/25 (15 tagoj)  
Novembro: 11/13-11/27 (15 tagoj)

\* En julio multaj jam ekvojaĝos meze de la monato, do mi volas komenci la Sumoon frue kaj mallonge.

Jasuo

### UEA



**SERĈATA: Nova Redaktoro de Revuo "ESPERANTO"**

Laŭ interkonsento kun la Estraro de UEA, la nuna redaktoro de Esperanto, Fabrício Valle, finos sian laboron en tiu posteno per la aprila numero de la jarkolekto 2016.

Tial UEA nun invitas kandidatiĝojn por transpreni la redaktadon de la revuo ekde numero 2016:5. Tio signifas eklabori jam komence de aprilo 2016. La sukcesa kandidato ricevos kontrakton por finredakti la jarkolekton 2016; decido pri renovigo/plilongigo estos farita en oktobro 2016. La redaktan laboron la redaktoro faros ĉefe en sia loĝloko. Tamen, estus avantaĝo se la sukcesa kandidato povus pasigi parton de aprilo en la Centra Oficejo por pli funde konatiĝi kun la atendoj kaj informfluo ligitaj al tiu laboro.

### Disvastigo de Esperanto



**Nova facebook-paĝo en turka lingvo por disvastigi Esperanton**

Nia amiko kaj Esperantisto Utku Gürdal kreis novan facebook-paĝon por trafi turkojn kiuj ankoraŭ ne aŭdis pri Esperanto kaj se eblas varbi ilin en nia ĉefa grupo "ESPERANTO TÜRKİYE". La nomo de la nova grupo estas "Esperanto - Uluslararası Tarafsız ve Adil Dil".

Nuntempe en la grupo estas afiŝataj bildoj, novaĵoj, kaj lingvaj elementoj de Esperanto en turka lingvo, kaj ni esperas ke multaj homoj ŝatos tiun paĝon. Eble kelkaj de ili ankaŭ interesiĝos pri Esperanto kaj fariĝos Esperantistoj.

La ligilo de la facebook-paĝo estas:

<https://www.facebook.com/turkiyeeesperanto/>

### Leteroj el geamikoj



**Nia gazeteto atendas leterojn el esperantisaj geamikoj!**

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri Esperanto kaj aliaj aferoj, siajn memorojn, siajn reĉenzon pri la libro ili jam legis ktp kaj ni aperigos ilin en nia gazeteto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon.

Nia kontakt-adreso estas: [vasilkadifeli@gmail.com](mailto:vasilkadifeli@gmail.com)

## La 9-a Mezorienta Kunveno



Eble vi ankoraŭ ne aŭdis pri tio sed inter la 1-a kaj 4-a de aprilo okazos la 9-a Mezorienta Kunveno

en Ürgüp urbeto en Kapadocio. Jam tridek esperantistoj aliĝis al tiu kunveno.

<b>Turkujo</b>	7
<b>Britujo</b>	1
<b>Danlando</b>	1
<b>Germanujo</b>	3
<b>Hispanujo</b>	1
<b>Italujo</b>	1
<b>Irano</b>	7

<b>Kartvelujo</b>	4
<b>Kroatujo</b>	1
<b>Nederlando</b>	1
<b>Svislando</b>	1

Post la kunveno en la 5-a kaj 6-a de aprilo estos du ekskursoj la unua tago ni vizitos la vidindaĵojn de Kapadocio kaj la dua tago ni vizitos Ihlara valon. Post tiuj du ekskursoj estos Naturamika ekskurso al Iznik urbo.

La temo de la kunveno estos Nazım Hikmet Ran kaj siaj poemoj. Por tiu celo ni jam

tradukis 60 poemojn kaj ni intencas disdoni almenaŭ 10 el ili kaj la vivpriskribo DE nazım Hikmet al la partoprenantoj en la formo de folietoj. La tutajn poemojn ni intencas publikigi kiel Esperanto libron se tio eblas.

[http://uea.org/vikio/La\\_naua\\_Mezorienta\\_Kunveno\\_en\\_Turkujo\\_en\\_2016](http://uea.org/vikio/La_naua_Mezorienta_Kunveno_en_Turkujo_en_2016)

## Gazetaraj Komunikoj de UEA N-ro 595 2015-11-20



ĜENERALA KONFERENCO DE UNESKO FINIĜIS – ZAMENHOF OMAĜOTA

La 38-a Ĝenerala Konferenco de Unesko finiĝis la 18-an de novembro post dusemajna laboro en la sidejo de la monda organizaĵo en Parizo. Kiel ruĝa fadeno tra ĝiaj diskutoj iris la 70-jariĝo de Unesko kaj la realigo de la Celaro 2030 por Daŭripova Evoluigo, sed en sia ferma parolado la Ĝenerala Direktoro s-ino Irina Bokova ne povis ne tuŝi la lastatempajn terorismajn atakojn, interalie meze de la konferenca periodo en Parizo mem: Tiu ĉi krima perfortaĵo trafas nin ĉiujn. Ĝi atakas ĉion, kio estas plej kara al ni: libereco, homaj rajtoj, la digno de ĉiu homo, nia sento de aparteno al la unusama homaro.

Por esperantistoj la plej ĝojiga decido de la Ĝenerala Konferenco estas la envicigo de la 100-a datreveno de la morto de L.L. Zamenhof (14-a de aprilo 2017) inter 53 datrevenoj kun kiuj Unesko estos "asociita" en la periodo 2016-2017. Propono! pri tio estis farita de Pollando, kun subteno de Germanio kaj Slovakio. Temas pri plia rekono de Unesko al Zamenhof post tiu okazo de la 100-a datreveno de lia naskiĝo, kiam li estis proklamita unu el la grandaj personecoj de la homaro. (Legu pli en Gazetaraj Komunikoj 588 de 2015-09-27).

Universala Esperanto-Asocio, kiu havas oficialan statuson ĉe Unesko ekde 1954, estis reprezentita de kvar observantoj: Renée Triolle, François Lo Jacomo, Oleksandra Kovyazina kaj Nathalie So Yun Kesler. Hazarde samtage, la 5-an de novembro, kiam estis akceptita la aŭspiciado de la Zamenhof-datreveno, UEA havis tempon ĉe la budo por ne-registaraj organizaĵoj, ĉe kiu la UEA-representantoj povis disdoni informilojn kaj respondi demandojn pri Esperanto kaj la agado de UEA.

## Enigmoj

### SUDOKU

			3			9		
	8			4			5	
6		1	8			4		
						7		8
	6			1			9	
2		8						
		7			1	3		2
	9			8			7	
					7			

Sudoku estas japana enigmo de kiu oni provas plenigi la kvadratojn per ciferoj de 1 ĝis 9. En ĉiu linio kaj horizontala kaj vertikala kaj en ĉiuj 3x3 kvadrato la ciferoj ne devas ripetiĝi.

La solvo estas jene, sed bonvolu unue provu solvi la engimon vi mem.

5	9	8	1	2	4	7	6	3
2	7	6	9	7	5	5	8	1
1	7	5	3	6	8	9	2	4
6	3	1	2	9	5	8	7	4
4	8	5	7	3	1	6	2	9
6	2	9	8	6	3	1	5	7
5	1	4	7	2	9	8	3	6
8	6	2	3	4	9	1	5	7
7	5	9	8	1	2	7	4	6
3	1	4	1	6	5	7	2	9





### Maljuna Avo kaj Nepo – rakonto de Grimm fratoj

Estis iam viro maljuna kiel la mondo. Liaj okuloj ne vidis klare, surdaj estis la oreloj kaj la genuoj tremis. Kiam li sidis ĉe la tablo li apenaŭ povis teni la kuleron, disverŝis supren sur la tablo – tikon kaj eĉ iafoje ĝi refluis el lia buŝo.

Tio estis abomena por lia filo kaj bofilino kaj fine ili sidigis la maljunulon en angulon post la forno kaj donis al li manĝaĵon en argila pladeto kaj neniam sufiĉe; li malĝoje rigardis al la tablo kaj liaj okuloj fariĝis malsekaj.

Foje liaj tremantaj manoj ne povis teni la pladeton, ĝi falis teren kaj rompiĝis. La juna virino insulte lin riproĉis, li diris nenion.

Oni aĉetis al li lignan pladeton por kelke da heleroj, kaj de tiu tempo li devis manĝi el ĝi.

Lun tagon, ili sidis en la ĉambro, ili vidis, ke la kvarjara nepeto kunmetas sur la planko lignajn tabuletojn.

Kion vi faras? demandis la patro.

Mi faras trogeton, respondis la infano, el ĝi manĝos paĉjo kaj panjo, kiam mi estos granda.

La geedzoj momenton rigardis unu la alian, ekploris kaj tuj ili alkondukis la avon al la tablo. De tiu tempo ili manĝis kune kun li kaj ne riproĉis lin, se li iom disverŝis.

### Vortareto

abomena	iĝrenĉ, itici, kötü
al-konduki	yol göstermek
apenaŭ	hemen hemen hiç
argila	kilden
bo-filino	gelin
dis-verŝi	dökmek, sıçratmak
ek-plori	ağlamaya başlamak
forno	fırın, ocak
genuo	diz
hel-er-o	parlak parça (burada demir para)
ia-foje	bazı kere
insulte	hakaretkar
kulero	kaşık
kun-meti	bir araya koymak
ligna	ağşap
plad-et-o	küçük tabak
re-flui	tekrar/geri akmak
riproĉi	kınamak
surda	sağır
tabul-et-o	küçük tahta
tremi	titremek
trem-ant-a	titreyen
trog-et-o	küçük yalak

### ŝercoj!



Patrino venas hejmen post laboro kaj demandas al la infanoj pri iliaj faroj.

— Mi... telerojn lavis! —  
respondas la unua.

— Kia bona vi estas! — diras  
panjo kaj donas al li ĉokoladon.

— Kaj mi... mi telerojn viŝis! —  
respondas la dua.

— Bonulo mia! Jen ankaŭ  
ĉokolado por vi.

— Nu, mi nur balais la splitojn kaj  
forportis ilin al la rubujo! — diras  
modeste la tria.

### Poemo

#### Ho, mia kor'

Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,  
el mia brusto nun ne saltu for!  
Jam teni min ne povas mi facile,  
ho, mia kor'!

Ho, mia kor'! Post longa laborado  
ĉu mi ne venkos en decida hor'?  
Sufiĉe! trankviliĝu de l' batado,  
ho, mia kor'!

L. L. Zamenhof



### La bona luktisto (\*)

- Vekiĝu, knabo! Jen la horo de la lukto.  
Kaj Horizonte frotis la okulojn, ne bone komprenante pri kia lukto li, la Bona

Genio, parolis.

- Mi estas laca! Lasu min dormi plu...

- Vekiĝu!

- Mi volas dormi!

- Ne prokrastu. Vekiĝu!

Kaj la knabo, ankoraŭ trenante la liton surdorse, laŭlitere, oscedanta, kaj malvolonte, obeis.

- Akompanu min vi!

Kaj stranga surprizo atendis la knabon en la granda ludsalono...

La oponentoj liaj estis kvadrataj aŭ rektangulaj entoj! Iuj estis dikaj kaj malaltaj, aliaj, maldikaj kaj altaj, kaj la plej ŝoka afero temis pri la fakto, ke ili, kvankam mutaj kaj silentaj, multe parolis! Foje, eĉ kriis! Kaj la plimulto insiste lin defiis:

- Luku! Luku!

Kaj Horizonte, tiel perturbita, fermis la pugnojn kaj etendis la brakojn, obeante tiujn frenezajn, strangajn ordonojn.

- Vi devos lukti alimaniere, Horizonte! Ĉu vi ne rimarkis, ke viaj oponentoj ne havas brakojn nek kruojn? Tiel avertis la Bona Genio.

- Do kiel mi luktos?! Kriis la knabo, tute perdita ene de tiu situacio.

- Vekiĝu, knabo! Vi bezonas iri al la lernejo!

Venis al li la patrina voĉo, al kiu li kore dankis, pro la liberigo de tiu terura premsonĝo.

En la lernejo, li ne sukcesis sufiĉan lertecon por plenumi la taskojn, kompreneble, sed nur li sciis la kialon.

Ĉar libroj lin endormigis, la instruistino severe lin admonis.

Nokte, denove la Bona Genio lin kondukis en la ludsalonon kaj denove li estis invitita lukti kun tiuj strangaj entoj.

Lia deziro estis forkuri, plori, sed li hontis tion fari.

Li estis valora knabo kaj certe lia Bona Genio ne forlasus lin.

Subite, la entoj sidiĝis ĉirkaŭe kaj antaŭ li aperis granda spegulo, kiu alportis sablan horloĝon kaj ĝin deponis sur la planko de la granda salono.

Horizonto ne plu detenis sin de larmoj, kaj ĉi-foje li

kaŝis la vizaĝon inter la manoj kaj singultis kortuŝe ĝis li estis venkita de granda laceco...

Li do, malrapide, levis la kapon kaj perceptis, ke ĉiuj rigardis lin, kvazaŭ li estus la plej stranga estulo de la mondo!

Kia ridinda situacio! Kial mi ne sukcesas foriri el tiu freneza loko? Pensis li.

- Ĉiuj grandaj lecionoj venas al ni per simboloj, Horizonte, diris la Bona Genio.

- Sed kial mi komprenas nenion?

- Mi eksplikos: la spegulo montras al vi la nuran personon, kiu estas kapablavenki ĉiujn malfacilaĵojn de la vivo, kiu estas vi mem!

La horloĝo montras la tempon, kiu estas vera trezoro en nia vivo.

La ludsalono, la luktoj por postvivado.

Kaj tiuj entoj, kiujn vi ne rekonis, estas malnovaj kaj valoraj kunuloj, kiuj delonge vin akompanas, kie ajn vi estis, estas aŭ estos.

- Sed kial mi ne ilin rekonas?!

- Rigardu pli detale.

Kaj kiam Horizonte rimarkis ĉi-foje sentime, la strangajn entojn, li perceptis, ke ili estis simple... libroj!

- Pro tio vi diris, ke mi devus lukti alimaniere, mia Bona Genio?

- Kompreneble, mia knabo. Kiam vi kreskos, tiuj lecionoj estos tre utilaj en via vivo!

Horizonto vekiĝis, rigardis la ŝrankon plenan de libroj kaj gardis en la memoro, la signifajn sonĝojn.

Iam, multe da jaroj poste, subite tiuj infanaj sonĝoj venis al lia menso kaj li organizis la plej interesan kaj la plej utilan ludon ne nur por li, sed ankaŭ por la personoj de l' tuta mondo.

La Esperanto-Literatura Sumoo, kie ni, esperantistoj el la kvin kontinentoj, lernas lukti kontraŭ ni mem, dum determinita tempo, legante libron elektitan de ni, obeante la kvanton da paĝoj legotaj, sendante la informon pri nia venko aŭ malvenko dum la realigo de tiu serioza lukto, kiam la oponentoj estas ni mem! Gratulon, Hori Jasuo, ĉar via entrepreno pligrandigas kaj plilarĝigas niajn horizontojn!

**Rio de Janeiro, 21 de novembro 2015**

**Dirce Sales - Fonto**

(\*) *Dirce Sales el Brazilo verkis rakonton aŭ fabelon pri*

la naski o de la Esperanto-Sumoo. Vi povas anka  
a skulti in el la vo o de japana esperantisto Janping  
en la jena ligilo:  
[http://www.esperanto-  
sumoo.strefa.pl/images/luktisto.mp3](http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/images/luktisto.mp3)

## Leterojn ni ricevis el geamikoj



### Esperanto ne estas sola



Esperanto estas la plej fama artefarita lingvo en la mondo. Ĝin kreis en la fino de la 19-a jarcento okul-doktoro Ludoviko Zamenhof. En la mondo dum tiu jarcento okazis la industria revolucio kaj homoj provis kompreni la mondon. En multaj aspektoj de la vivo tiu estis granda bezono. Kaj la samo estis vera pri lingvoj. La vera nomo de Esperanto en la komenco estis "Lingvo internacia" sed nacioj ne sufiĉe komprenis tiun projekton.


Nun ni estas en la 21-a jarcento kaj ni havas interreton. Esperanto kaj la aliaj artefaritaj lingvoj profitas de teknologio. Ĉiuj naturaj kaj artefaritaj lingvoj estas komuna heredaĵo de la homaro. Mi ekde longa tempo interesiĝas pri lingvoj. Mi studis sociologion kaj artefaritaj lingvoj estas mia ĉefa intereso. Mi kredas ke artefaritaj lingvoj plifortigas nian interkompreniĝon kaj apogas nian esperon por pli bela mondo. La vojo al senkaosa mondo bezonas interkompreniĝon.

Mi ankaŭ eksperimentas per artefarita lingvo, kiun mi mem kreis antaŭ kvin jaroj kaj estas nomita "Nomuli". Mia unua tre simpla eksperimento per artifarita lingvo estis en la jaro 2002. En la jaro 2012 mi plibonigis kaj aperigis ĝin per la nomo "Nomuli".

**Mustafa Kaptan (24) Istanbul**



### Saluton geamikoj



kun mia familo.

Mi estas Ziyahan el Turkujo. Mi konatiĝis kun Esperanto antaŭ kelkaj monatoj. Mi estas komputila programisto. Mi imagas prepari retpaĝon por la tuta programistaro, kiu volas lerni ambaŭ Esperanton kaj programadon. Mi loĝas en Istanbul

Mi estos ĝoja legi viajn mesaĝojn.  
Dankon, vidi vin!

**Ziyahan Albeniz (29) Istanbul**



### Saluton,




Mia nomo estas Konuralp Sunal. Mi estas artisto, verkisto, aktoro kaj konsilisto. Post mia fantazia verko "Fabeloj de Vordonisi" mi decidis translokiĝi al iu insulo, do mi nun loĝas en la belega Büyükada insulo. Mi sendos al vi fragmentoj el miaj fantaziaj verkoj por ke ili estu publikigitaj en Esperanto lingvo. Mi esperas ke ili ne enuigos vin.

**Konuralp Sunal (1966) Istanbul**



### Saluton,



Mi estas D-ro Erhan Ateş. Mi estas infan-doktoro kaj mi verkis du librojn pri kiel oni devas prizorgi bebojn. De tempo al tempo mi sendos al vi artikolojn pri sano, vino, vojaĝo kaj pri aliaj diversaj amuzaj aferoj de vivo. Mi atendas nian novan revuon senpacience.

**Erhan Ateş (1962) Istanbul**



### Saluton,



Mi nomiĝas Murat Özdzidar. Mi instruas ĥemion en la lernejo de Üsküdar Amerikan Akademisi. En la lernejo mi kaj miaj gelernantoj kreis Esperanto-Klubon kaj ni lernas la lingvon ekster la lernejaj horoj.

Mi esperantiĝis antaŭ ol 33 jarojn hazarde kaj mi tute



ŝatis Esperanton. Mi vojaĝis al multaj landoj pere de tiu lingvo kaj mi havas multajn esperantistajn geamikojn en la tuta mondo. Mi ankaŭ gastigas Esperantistojn en mia domo. En Ĥznik urbo mi havas vilaĝan domon kun belega vido de Ĥznik lago. Mi renovigis la domon kaj nomis ĝin "Esperanto Domo". Mi atendas esperantistojn por gastigi ilin per malaltaj prezoj kaj promeni kune kun en la bela kampara regiono de Ĥznik.

De tempo al tempo mi verkos en Esperanto por nia revueto celante ke la turkaj esperantistoj legu ilin kaj plibonigu ilian lingvon.

Amike,  
**Murat Özdizdar (1962) Istanbul**

## Gravaj Tagoj



### HALTU PERFORTON KONTRAŬ VIRINOJ !

Pasintjare la organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj deklaris ke la 25-a de novembro estu la tago por "Halti perforton kontraŭ virinoj". Ĉi jare la koloro de tiu tago estas oranĝ-kolora !

<http://www.un.org/en/events/endviolenceday/>

**25an de Novembro**

<http://www.un.org/ar/events/endviolenceday/>

- IO — Internacia tago por elĉirko de la perforto kontraŭ la virinoj
- FR — Journée internationale pour l'élimination de la violence à l'égard des femmes
- EN — International Day for the Elimination of Violence against Women
- ES — Día Internacional de la Eliminación de la Violencia contra la Mujer
- RU — Международный день борьбы за прекращение насилия в отношении женщин
- ZH — 消除对妇女的暴力行为国际日
- AR — اليوم الدولي للقضاء على العنف ضد المرأة



### Zamenhofa Tago - Esperanta Libro-Tago

La 15-a de decembro estas la naskiĝtago de L. L. Zamenhof (1859-1917), la iniciatinto de Esperanto, kaj ĝi estas la plej vaste celebrata festotago en la Esperanto-kulturo. Oni nomas ĝin "Zamenhof Tago" aŭ "Z-Tago".



Kelkaj Esperanto-parolantoj, proponis celebradon de la 15-a de decembro ankaŭ kiel la Tago de Esperanto-literaturo aŭ "Tago de Esperanto-libro" aŭ "Esperanto-Librotago". Tial ili kuraĝigas Esperanto-organizaĵojn kiuj okazigas renkontiĝojn dum tiu tago aldoni libro-recenzon aŭ poem-deklamadon en la programon, aŭ anonci publikigon de nova libro. Esperantistoj en tiu tago aĉetas libron aŭ ekkomencas legi novan libron.

En la maldekstra estas afiŝoj kreitaj por la jaro 2015. La unua estas ĝenerala afiŝo por la Z-Tago kaj la dua estas propra turka-lingva afiŝo por la Esperanto Librotago.



### Merhaba arkadaşlar,

Dergimizin bu kısmında bir de basit Esperanto kursu verelim istedik. Ayda tek bir ders ile yabancı dil artık ne kadar öğrenilebilirse diyerek başlıyoruz.

Önce Esperanto dilinin kendisi hakkında kısa bir bilgi verelim. Her şeyden önce Esperanto'da kelimeler yazıldığı gibi okunur, benzer kelimelerde farklı telaffuzlar yoktur. Aynen Türkçe'deki gibi.

Esperanto alfabesinde 28 harf vardır. Türkçe'den farklı sadece 3 ses vardır (c, ĥ ve ŭ harfleri). Geri kalan seslerin hepsi bildiğimiz seslerdir. Sadece bir kaç sesi Esperanto'da başka harfler verir. Tabi 6 tane de şapkalı dediğimiz özel harf vardır. Hemen alfabe tablosunu aşağıda veriyoruz. Parantez içindekiler harfin adıdır, örnek olarak türkçede "b" harfine "be" dediğimiz gibi. Her harfin adındaki ilk ses o harfin sesidir.

Aa (a)	Ee (e)	Ĥĥ (kho) <sup>2</sup>	Ll (lo)	Rr (ro)	Ŭŭ (uo) <sup>4</sup>
Bb (bo)	Ff (fo)	li (i)	Mm (mo)	Ss (so)	Vv (vo)
Cc (tso)	Gg (go)	Jj (yo) <sup>3</sup>	Nn (no)	Ŝŝ (ŝo)	Zz (zo)
Ĉĉ (ĉo) <sup>1</sup>	Ĝĝ (co)	Ĵĵ (jo)	Oo (o)	Tt (to)	
Dd (do)	Hh (ho)	Kk (ko)	Pp (po)	Uu (u)	

<sup>1</sup> Türkleri en fazla zorlayacak harf budur. "Otsu bitkiler" deki "ts" harflerinin birlikte ve hızlı şekilde söylenmesi gibi bir sesi vardır. "C" yani "tso" demeye çalışın.

<sup>2</sup> Kalın bir "h" sesi gibidir, çok az kullanılır dolayısı ile üzerinde durmaya gerek yok. "H" diye okuyabilirsiniz.

<sup>3</sup> Esperanto'da "y" harfi yoktur, bizim "j" harfine benzeyen harf "j" sesini verir. Şapkalısı yani "ĵ" ise bizim "j" sesini verir, lütfen karıştırmayın.

<sup>4</sup> "uo" ya da "vo" diye ses veren bu harf aslında bir "yarı sesli" harftir ve "a" ile "e" harflerinin sonrasına geldiğinde "au" ya da "eu" gibi ama birleşik tek bir ses verir. Ve ayrı harfler olmadıklarından ikisi birden aynı hecede bulunurlar. Hecemeleme genelde Türkçeye benzer ama hecelerken şaşırmayalım. Örnek "aŭ-to" "eŭ-ro-po". Bu kelimelerin anlamını eminiz anlamışsınızdır.

Son bir şey olarak, Türkçe'de olmayan vurgu Esperanto'da var! Tüm yabancı dillerde olduğu gibi Esperanto dilinde de vurgu vardır ancak Esperanto'da hep sondan bir önceki hecededir. Örnek yukarıdaki "eŭ-RO-po" da vurgu "ro" hecesindedir. Tüm kelimelerde bu böyledir. Vurgu işi Türkleri yabancı bir dil öğrenirken zorlayan bir şeydir çünkü Türkçe'de vurgu olmadığından vurguyu anlayacak kulak da gelişmemiştir.

Kursumuz çok basit bir kitap olan Avustralyalı G.Gladstone Solomon'un "Esperanto por infanoj" kitabındaki derslerden olacak. Kitap çok eskidir taa 1934 yılında yazılmıştır ancak oldukça iyi bir kitaptır.

Her dergiye bu kitaptan bir iki ders koyacağız, her dersin sonunda da ekler, sözlük ve dilbilgisi ile ilgili tanımları vereceğiz. Korkmayın dilbilgisi Esperanto'da çok basittir. Ancak eski dergilerinizi atmayın çünkü bu dilbilgisi tanımlarını ya da açıklamalarını bir kere vereceğiz, sonraki derslerde bunları bildiğinizi varsayacağız.

Konu içindeki kelimelerde bolca tire yani "-" işareti kullanıldığını göreceksiniz. Bunun amacı kelimelerin ön ve arka eklerini gözle görülebilecek şekilde ayırmak içindir. Yoksa Esperanto'da kelimeler böyle yazılmazlar elbette. Esperanto'da bolca ek bulunur ve bu da dilin kolay öğrenilmesine çok fazla yarar sağlar. Ayrıca farklı bir kelime oluşturmak için iki veya daha fazla kelimeyi birleştirmek diye bir imkan vardır Esperanto'da. Bu da bu dilin başka bir güçlü tarafıdır. Metindeki bu tip kelimelerdeki ess kelimeleri gözle ayırtılabilmek için gene tire işaretleri kullanılmıştır.

**Hadi bakalım başlıyoruz hepinize kolay gelsin....**



## Leciono 1 - LA FAMILI-O

Est-as kvin person-oj en la famili-o de Sinjor-o Mus-o; patr-o, patr-in-o, kaj tri infan-oj.

Sinjor-o Mus-o est-as la patr-o.

Sinjor-in-o Mus-o est-as la patr-in-o.

Roĝero, Ŝila kaj Johano est-as la tri –infan-oj.

Roĝero est-as la fil-o de Sinjor-o kaj Sinjor-in-o Mus-o.

Johano ankaŭ est-as ili-a fil-o.

Ŝila est-as ilia fil-in-o.

Roĝero est-as la frat-o de Ŝila kaj Johano.

Johano est-as la frat-o de Roĝero kaj Ŝila.

Ŝila est-as la frat-in-o de Roĝero kaj Johano.

Roĝero est-as knab-o. Li port-as pantalon-on kaj ĉemiz-on.

Johano ankaŭ est-as knab-o. Li ankaŭ port-as pantalon-on kaj ĉemiz-on.

Sed Ŝila est-as knab-in-o. Ŝi port-as rob-on.

La patr-o hav-as baston-on kaj pip-on.

Li fum-as la pip-on. Fum-o ven-as el la pip-o.

La patr-in-o hav-as ombrel-on kaj korb-on.

En la korb-o est-as kvin ov-oj.

Roĝero hav-as vip-on. Jes, li hav-as vip-on.

Ŝila ne hav-as vip-on ; sed ŝi hav-as bird-on.

Johano ne hav-as vip-on kaj li ne hav-as bird-on; sed li hav-as vagon-on.

### Ekler Aŝıklama

- ar Bir ismi ĉoĝul hale getirir: vagon-o > vagon-ar-o (vagon > vagon katarı, sürüsü veya tren)
- as Fiiller için şimdiki zaman ekidir (hav-as)
- in Kelimeye dişı anlamını veren ektir (viro > vir-ino, erkek kadın)
- j Ĉoĝul ekidir. İsim ve sıfatların sonunda kullanılır
- n Geçişli fiiller'in objelerini işaret eder. "Akuzativo" olarak bilinir. İsmın i-hali formudur.
- o İsim ekidir. Tüm cins isimler bu ek ile biterler (vip-o)
- oj İsmın ĉoĝul formu ekidir (vip-oj)
- ojn İsmın, ĉoĝul formu ve geçişli fiil objesi ekidir (vip-ojn)
- on İsim ve geçişli fiil objesi ekidir (vip-on)

<b>Kelime</b>	<b>Açıklama</b>
ankaŭ	Aynı zamanda, da, dahil anlamında. İngilizce'de "also"
baston-o	Baston
bird-o	Kuş
ĉapel-o	Şapka
ĉemiz-o	Gömlek
de	"(Ahmet)-in" formu, yani iyelik belirtir. Ahmet'in. Ayrıca (bir yer)-den anlamına gelir
du	İki
el	Bir şeyden dışarıya anlamını verir.
en	İçinde
est-as	"Yardımcı" fiil. Bizdeki -dir eki. İngilizcedeki "to be" fiili yani "is/are" gibi.
famili-o	Aile
fil-in-o	Kız çocuk (birisinin kızı anlamında)
fil-o	Erkek çocuk (birisinin oğlu anlamında)
frat-in-o	Kız kardeş
frat-o	Erkek kardeş
fum-as	"Tütmek" fiili, bu derste pipo içmek için kullanılmış. Fiilin mastar formu "fum-i".
fum-o	Duman
gren-o	Buğdaj
hav-as	"Sahip olmak" fiili, ingilizcedeki "have/has". Mastar formu "hav-i".
ili	Onlar zamiri.
ili-a	Onların. Sonunda -a eki olan tüm kelimeler sıfattır. Burada zamirden sıfat oluşmuş. İyelik zamiri.
infan-o	Çocuk, yavru, evlat anlamında
Jes	Evet
kaĝ-o	Kafes
kaj	Ve
knab-in-o	Kız çocuk
knab-o	Erkek çocuk
korb-o	Sepet
kuf-o	Başlık
kvar	Dört
kvin	Beş
la	Belirleyici artikel. Esperanto'de tektir. İngilizcedeki "the".
lecion-o	Ders
li	"O" zamiri erkek formu. İngilizce'deki "he".
mus-o	Fare. Hikayedeki kahramanlardan baba ve annenin soyadı.
ombrel-o	Şemsiye
ov-o	Yumurta
pantalono	Pantolon
patr-in-o	Anne
patr-o	Baba
person-o	Kişi, şahıs
pilk-o	Top
pip-on	Pipo
port-as	"Taşıyor, giyiyor" fiili. Mastar formu "port-i".
rad-o	Tekerlek
rob-o	Elbise, kadın robu
sak-o	Torba
ŝal-o	Şal
sed	Fakat, ama
ŝi	"O" zamiri dişi formu. İngilizce'deki "she".
sinjor-in-o	Bayan







### Herkese merhaba !

Umarız dergimizin bu ilk sayısını hepiniz beğenmişsinizdir. Her ay başında sizlere arkalı önlü en az iki adet A4 sayfası uzunluğunda, yani toplamda dört sayfalık bir dergi sunmayı planlıyoruz. Amacımız ne siyasi ne de politik bir dergi çıkartmak, sadece Esperanto dilini sevenleri bir araya getirmek ve onlara her ay okuyacakları bir kaç sayfa hazırlamak.

Bu sayımızda sizlere :

- Esperanto kurslarımızdan kısa haberler verdik.
- 2016 yılındaki Sumoo kitap okuma günlerinin tarihlerini bildirdik.
- UEA'dan kısa bir haber verdik : "Esperanto" dergisi için yeni bir direktör aranıyormuş.
- Yurtiçinde Esperanto dilinin tanıtımını yapmak üzere arkadaşımız Utku Gürdal tarafından kurulan yeni bir facebook sayfasından bahsettik.
- Dergimize yazı yazmak isteyenlere çağrıda bulunduk.
- Nisan ayı başında Ürgüp'te düzenleyeceğimiz uluslararası 9. Ortadoğu Toplantısı hakkında kısa bilgi verdik.
- 2017 yılında Zamenhof'un ölümünün 100 yıldönümü dolayısı ile Unesco'nun anılacak kişiler listesine girdiğinden bahsettik.
- Şimdilik basit ama belki ilerde daha farklı ve kapsamlı olacak bir bilmecce köşesi hazırladık.
- Biri basit diğeri orta seviyede iki okuma parçası verdik. Basit olana kısa bir de sözlük ekledik. Esperanto dilini öğrenenlere bunları okumaya çalışmalarını tavsiye ediyoruz.
- Eğlence köşesinde bir karikatür bir de fıkra verdik.
- Zamenhof'un yazdığı "Oh kalbim!" adlı kısa şiiri yayınladık.
- Bir kaç müstakbel okuyucumuzun yazısını yayınladık.
- Önemli bazı günler hakkında bilgiler verdik.
- Bir de Esperanto kursu başlattık. İlk ders için çok fazla bilgi verdiğimizizi düşünüyoruz. Bu bilgileri sindirmeye çalışın. Temeli sağlam attıktan sonra diğeri dersler çok daha kolay ve hızlı olacak.

Bu kapanış yazısı dışındaki herşeyi Esperanto dilinde yaptık. Yurtdışındaki bazı dergilerde Esperanto metni yanında aynı metni yerel dilde de vermeğe çalışıyorlar. Belki bazı metinlerde biz de sonraki sayılarda aynısını yapmaya çalışabiliriz.

Dergimize Esperanto dilinde 2-3 paragraflık kısa mektuplar, kısa yazılar bekliyoruz. Fikir olarak bize anılarınızı, Esperanto ile ilgili görüşlerinizi ve tecrübelerinizi, kendiniz ve Esperanto bilginiz hakkında görüşlerinizi ve daha bir çok konuda bize yazılar, haberler gönderebilir hatta bunlara bir resim de ekleyebilirsiniz. Bize yaşınızı ve yaşadığınız şehri bildirmeyi unutmayın, isteyenler küçük bir profil fotoğrafı da gönderebilirler.

Varsa sorularınızı yazın yanıtlayalım herkes birlikte öğrensin. Ama bunun için en iyi yer facebook'taki "ESPERANTO TÜRKİYE" grubumuzdur.

<https://www.facebook.com/groups/7121509722/>

Her ayın ilk 10 gününü yazı toplama süresi, ikinci on gününü yazıların düzenlenme süresi, son on gününü ise derginin hazırlanma süresi olarak belirledik. Bir aksilik olmazsa eğer dergi her ayın ilk haftasında posta kutunuzda olacaktır.

Bize yazı göndermek için facebook grubumuzu kullanabilir ya da yazılarınızı [vasilkadifeli@gmail.com](mailto:vasilkadifeli@gmail.com) adresine gönderebilirsiniz. Dergiye aone olmak ya da abonelikten ayrılmak için gene bize yazabilirsiniz.

*Sonraki sayıda buluşmak üzere...*